
# *Xi Jinping al Donald Trump: Covid-19 ne agnoskas rasojn nek landlimojn*



Pekino, mar 27 (RHK) La prezidento de ?inio, Xi Jinping emfazis al sia homologo usona Donald Trump, la gravecon ke inter ?iuj landoj kontra?batalu la pandemion de Covid-19, tial ke la malsano ne agnoskas landlimojn.

Dum telefona dialogo, Jinping insistis ke "nur kolektiva respondo de la internacia komunumo povas ?in venki".

Li aldonis ke ?inio pretas kunordigi strebojn tiucelajn kun la cetero de la mondo, inkluzive kun Usono, samkiel transdoni materian helpon la? siaj kapabloj,raportis la informagentejo Prensa Latina.

Li memorigis ke tuj post eksplodo de tiu malsano ?inio dividas informojn malferme, travideble kaj respondece pri ?ia evoluo, trajtoj, diagnozaj proceduroj kaj traktado.

Li emfazis ke "la viruso ne agnoskas landlimojn, nek rasojn kaj estas komuna malamiko de la homaro", kaj insistis pri kunlaboro bonfara kaj ignori konfronti?on.

Temas pri la unua interago inter Xi kaj Trump post la stre?i?oj kreitaj inter amba? landoj pro la origino de Covid-19 kaj la respektivaj limigoj al la amasmedioj.

?inio vetas por kunlaboro en la monda agado kontra? la malsano, kaj tiurilate, ?i transdonis konojn, materian asistadon kaj spertulojn al 83 landoj kaj tutmondaj organizoj dum la lastaj semajnoj.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/217981-xi-jinping-al-donald-trump-covid-19-ne-agnoskas-rasojn-nek-landlimojn

**Radio Habana Cuba**